

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 19/11/2020 Kvinentkvinna eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



Entute **754,900** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **287,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **220,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **213,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)


Nun studas **34,900** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde februaro 2020 ?)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

EKSTRAĴOJ ĈE LECIONO 10 DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).



N.ro 10 de "Por Komencantoj".

Krom la kvin Verboformoj, nome tiuj kun -as, -is, -os, -us, kaj -u, ekzistas duonverbo kiu ne uzatas kiel la centro de la Predikato, sed kiu uzatas plej ofte kiel Substantivo. Ĝi nomiĝas "Infinitivo" kaj havas la verban finaĵon "-i". Ĝi funkcias kiel kvazaŭverbo post la modaj helpverboj (precipe "povi, voli, rajti, devi, kuraĝi, kaj kelkaj aliaj), ekz. "Ŝi volas hejmen IRI nun". En ĉiuj aliaj kazoj la Infinitivo funkcias kiel Substantivo. Jen ekzemploj:
KIEL KERNO DE LA SUBJEKTO: Senĉapele PROMENI nun estas danĝera por la sano.



DRINKI dek litrojn da biero egalas al simortigo.

KIEL PREDIKATIVO: La celo estas HEJMVENI antaŭ la vespermanĝo.

La nuboj en la ĉielo aspektas NEMOVIĜI.

KIEL GRAMATIKA OBJEKTO: Ili hodiaŭ ne ŝatas LUDI en la ĝardeno.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Ŝi certe ne deziras MANĜI tiujn pomojn (= la manĝadon)

KIEL ADJEKTO: Ni venis por LUDI. Ni ludis sen PENSI pri la horo.

KIEL KOMPLEMENTO: NI vidis la stelon MALAPERI. La arto de DESEJNI valoras studati.

. (daŭrigota) **Marcel Leereveld.**



Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>



Homoj protektas aliulojn per la surporto de masko

Protektilo por la **surportanto** sed ankaŭ por la **proksimuloj** **Roger Springer**



La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm la unuan

kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.

Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj

La 21a de novembro estos la tria sabato. VENU!

Roger Springer

La antaŭa kunveno . Venis Roger Springer, Chris Holliss kaj John Casey

Post babiladeto pri omaroj kaj Trump (apartaj temoj), ni komencis legi artikolon el

"Monato"(2019) verkita de Cristina Casella (Flandra Ligo) "Noveca Artefarita Mano Prezenta en Romo".

Ni zorge legis tiun tekston kaj studis kaj la kunmetitajn vortojn kaj sufiksojn.

John kurage tradukis tion dum Roĝero kaj mi serĉis vortaron por kelkaj novaj kaj teknikaj vortoj




Tre ĝuinda kaj helpema sabata mateno.

Chris Holliss



Esperanto-Klubo de la Centra Marbordo

Dimanĉon, la 15-an de novembro, okazis malgranda kunveno ĉe la kafejo *The Milk Factory, Wyong*.



Nur kvar ĉeestis: Joanne, Alan, Amy kaj Jonathan, tamen ni havis agrablan tempon.

Malgraŭ la kutima konsilo, nia diskuto inkluzivis religion (kaj filozofion). Ni demandis, ekzemple, ĉu ekzistas vivo post morto, ĉu ni havas animojn kaj ĉu ni vere havas liberan volon. Ne surprize, ni ne atingis definitivan konkludon, tamen la diskuto estis ja interesa.



Jonathan Cooper



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

“Trump” istoj kaj trompisto.

“TRUMP”-ISTOJ KAJ TROMPISTOJ.



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Pli ol duono de la homaro ĝojas, ke Trump ne plu estas prezidisto de Usono, ĉar ili malamas lian aĉan lingvon por altiri la fidon de la civitanoj. Liaj admirantoj ja fidis lin ĉar ili ŝatas kaj fidas lian lingvon kaj liajn ideojn, grandparte ĉar ili mem ŝatas aŭ ŝatus uzi similan lingvon. Ili ne konscias, ke li faras tion por altiri ilian fidon kaj elektosubtenon por fari kion li volas, kaj povas. Li estas demagogo por havi potencon kaj avantaĝojn. Li kompreneble devas obei la cirkonstancojn, inkluzive de la pli fortaj potencoj en la socio.

Sed kio pri la alia duono de la civitanaro? Ĉu ili estas pli bonaj, fidante kaj subtenante politikiston kiu ankaŭe agadas por altiri la fidon kaj la subtenon de la elektantoj. Li aŭ ŝi uzas tian lingvon kaj tiajn ideojn kiuj plaĉas al alia parto de la civitanaro, kiu estas malpli aĉa kaj malpli fia. Sed li aŭ ŝi same faras tion por altiri la elektantojn, kiuj devas fidi kaj subteni lin aŭ ŝin. Ĉar li aŭ ŝi bezonas tiun fidon kaj tiun subtenon por elektati kaj por poste regi ilin por sia propra avantaĝo kaj por fari kion li aŭ ŝi volas por reteni la politikan potencon. Ankaŭ li aŭ ŝi devas, kiel demagogo, kredigi ke li aŭ ŝi decidas kaj faras tion kio estas utila, dum li aŭ ŝi ĝenerale povas fari nur tion kio helpas lin aŭ ŝin persone, kaj kion li aŭ ŝi devas fari por kontentigi la pli fortajn potencojn en la socio, nome la grandajn internaciajn kompaniojn. Do kvankam la stilo diferencas, la rezulto por la lando kaj ĝia popolo estas la sama. Escepte pri la stilo, ni ne bezonas timi pri la rezulto, kiu favoros la potenculojn, la internaciajn korporaciojn, kies lingvo kaj ideoj estas la kaŝa ekspluatado de ni kaj de nia lando. En ambaŭ kazoj temas pri trompado, ĉar la politikistoj devas kaŝi la potencon de la kompanioj, de siaj mastroj. Por ambaŭ stiloj tio postulas alian klerecon, trompadon. **Marcel Leereveld.**

HELPVERBOJ.

Ekzistas du specoj de Helpverboj en Esperanto (same en aliaj eŭropaj lingvoj): la Veraj Helpverboj (“Modaj Helpverboj”) kaj la Neveraj Helpverboj (“Helpverboj”).

La Neveraj Helpverboj en Esperanto difinas nur Infinitivon (Mi ŝatas MANĜI nun), ĉar participoj ne estas verboj sed adjektivoj (“estas trovinta”, “estis trovata hieraŭ”). Kelkfoje (kun verboj de moviĝo) oni uzas anstataŭ la formon de helpverbo kun infinitivo (li iris aĉeti lakton) la formon de memstara verbo sekvata de infinitivo kun prepozicio (li iris por aĉeti lakton). Teĥnike en la lasta formo temas pri memstara verbo (nehelppverbo) kun adjekto. Ĉar en Esperanto ne ekzistas verbaj participoj, en ĝi troviĝas multe malpli da helpverboj ol en eŭropaj landoj, se ne oni nomas la verbojn kun Predikativo ankaŭ helpverboj, kiel en “Ŝi restis SENMOVA” kaj “Ili trovis la hundon MORTANTA”.

La Veraj Helpverboj nombras nur sepon kaj difinas la ĉefverbon kvazaŭ kiel afiksoj, kaj tial la du kune devus esti en la eŭropaj lingvoj kaj Esperanto pura verbo kun speciala afikso (ekz. “Li volmanĝas” kaj “Ŝi devkuiras”). Sed ili ne estas kaj tial Zamenhof kreis ilin kiel la etnaj lingvoj, nome kiel helpverbojn. Ke la modaj helpverboj estas funkcie afiksoj montras ankaŭ de la fakto, ke ambaŭ agoj okazas kune, ne nur unu ago. Jen ekzemploj: **1).** Mi povis veni (= mi povis kaj mi venis). **2).** Ŝi volis naĝi (= ŝi volis kaj naĝis). **3).** Li rajtas bicikli tie (= li rajtas kaj li biciklas). **4).** Morgaŭ tiu viando devos manĝati (ĝi devos kaj manĝatos). **5).** Morgaŭ tiu viando devos esti manĝita (ĝi devos kaj ĝi estos manĝita). **6).** Ŝi daŭras kanti (= Ŝi daŭrkantas) (ŝi daŭras kaj kantas). **7).** Ni kuraĝis transosalti (ni kuraĝis kaj transosaltis). Se ni uzas similsignifan Neveran Helpverbon, la ĉefa ago povas sed ne bezonas okazi samtempe. Jen tiel

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

la samaj aŭ similaj frazoj: **1).** Mi kapablis veni (sed eble ne venis). **2).** Ŝi deziris naĝi (sed eble nur deziris kaj ne naĝis fakte). **3).** Li havas la permeson bicikli tie (sed eble ne biciklas). **4)** Morgaŭ ni intencos, se eble manĝi tiun viandon (sed eble ne manĝos ĝin). **5).** Morgaŭ ni esperos esti manĝintaj tiun viandon (sed eble ne estos ĝin manĝintaj). **6).** Ŝi promesis kanti (sed eble ne kantis). **7).** Ni proponis transosalti, (sed ni eble ne transosaltis).

En la negativo: “Mi ne povis fari tion” = Mi ne povis nek faris, kaj “Mi volis ne manĝi” = Mi volis kaj ne manĝis, dum “Mi ne volis ne manĝi” = Mi volis kaj mi manĝis. **Marcel Leereveld.**



Ideoj malrapide ŝanĝiĝas

Ju pli mi aĝiĝas, des pli mi sentas min kiel dinosaŭron perditan en moderna epoko, kies teĥnologio eskapas al mia kompreno. Kvankam por la sciencistoj, la klarigoj de Einstein anstataŭis tiujn de Newton jam kvardek jarojn antaŭ ol mi studis fizikon, la programo en mia lernejo estis pli malpli la sama kiel tiu de la lernejo de miaj gepatroj. Sed mi ne povis kredi ke la sciencisto David Blair, en nia dudek unua jarcento, estas taksata pioniro, kiu provis instrui la modernan manieron vidi la mondon al la infanoj de baza lernejo. Kial atendi ke studentoj atingu la universitaton por finfine enkonduki pli adekvatan bildon de nia universo, kiam ili jam kutimas pensi laŭ la malmoderna Newton-a koncepto? Kiom longe bezonas ideoj por ŝanĝi? Ĉu miri ke tiom da homoj kredas kiel verajn la “falsajn” novaĵojn, timas modernan teknologion kiel 5G ktp? Kial la gepatroj ne forte premas la edukadinstancojn por ke iliaj infanoj estu pli bone preparitaj por kompreni sian mondon, ne nur ĝui la komforton kaj eblecojn kiujn scienco provizas, sen profunda kono de la fenomenoj. **Franciska Toubale**



Brisbana Esperanto-Societo



Linda, Sofia, Paŭlo, Petro, Doug, Oscar. Anna fotis la bildon.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Lastan sabaton BES membroj kunvenis en Kabultjur ĉe la hejmo de Linda kaj Petro Danzer. Post la formala kunveno membroj ĝuis la tagmanĝon, kiun kuiris Linda sur la korteto ĉirkaŭata de frusomeraj plant-belecoj. Ankaŭ membroj konigis kun la libroj- donacoj de Esperantistino, Jennifer James, de Bundaberg. Speciala intereso estis la libreto " Brolgo", tradukita de grupo de la Brizbana-Esperanto Societo antaŭ 27 jaroj. En ĉirkaŭ kvar semajnoj ni festos Zamenhof Feston en Redcliffe. **Petro Danzer**



Volo Gueltling

En AEA-fotoj de renkontiĝoj dum pasintaj jardekoj mi vidis keklfoje la vizaĝon de Volo Gueltling. Jam de longe mi ne legis nek aŭdis pri li. Lia nomo ne estas sur la listo de AE ricevantoj. Ĉu iu scias ion pri nia amiko,ĉu ankoraŭ vivanta, aŭ eble forpasinta? Antaŭ dankojn - **Vera Payne.**



Korajn gratulojn al Heather Heldzingen

pro ŝia naskiĝtago antaŭ kelkaj tagoj (14 Novembro).

Heather estas ege valora membro de la aŭstralia Esperanto-movado. Jam plurajn jarojn ŝi estas la p i v o t o de la aŭstralia Esperantistaro.



Mi scias, ĉar jam dum multaj jaroj mi observis ŝin en ŝia grandega organizado de ĉiaj kunvenoj !

Ŝia klera kaj grandega laboro , ofte ne rimarkata, estas enorma pro ŝia klera organizkapablo. Ĉiufoje mi miras pri tio.

Mi unue renkontis ŝin kiam ŝi estis knabino, en la klubejo de la Melburna Esperanto-Asocio. Poste ŝi feliĉe edziniĝis al Ivan, kaj moviĝis al Boronia, kie ili starigis Esperanto-klubon. Je la fino de la jarcento ili retrovenis al Melburno, kaj ree aniĝis al la Melburna Klubo. Post tio estis ŝi kiu organizis la plej multajn aktivecojn. Kaj ankaŭ interŝtatajn kunvenojn. Ĝis nun ŝia neelĉerpebla energio estas pivota por nia Esperanto-movado, eĉ en malfacilaj tempoj por A.E.A.

Ankaŭ mi ŝuldas al ŝi mian sukceson en Esperantujo ĉar Heather laboris, dum pluraj jaroj, ŝanĝante mian gramatiklibron al elektronika kopio; tiu laboro ŝia kostis al ŝi centon da horoj. Sen tiu ŝia enorma laboro mi ne estus konata Esperanto-specialisto. Estas miriga, kiel klere ŝi sukcesas uzi sian tempon por pivoti la Esperanto-movadon.

Do ree: korajn gratulojn je ŝia naskiĝtago !

Marcel Leereveld.



3ZZZ

La elsendo de la 16a de novembro celas tiujn, kiuj aŭ instruas aŭ daŭre provas plibonigi sian konon de Esperanto. En ĝi Szaboles Szilva klarigas kio estas la KER ekzaminaro kaj prezentas sian libron por tion prepari. Estas prezentita la baldaŭ aperanta libro verkita sub la kontrolo de Katalin Kovats Manlibro pri instruado de Esperanto. Ĝi entenas ankaŭ malpli seriozajn erojn kiel la "Blaga Blogo"-n de Viktoro Sole .



Franciska Toubale



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE